# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-05 n-ro 407

# Antaŭlasta konservejo de nuklaj poluitaĵoj




Sud-Afriko: la loĝantoj de getourboj de Johanesburgo mortas pro poluado

Elektra baterio kiel energikonservilo

Federica Mogherini: EU subtenos Kubon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Sud-Afriko: la loĝantoj de getourboj de Johanesburgo mortas pro poluado
*Duoble viktimoj de la mizero p. 03*

Federica Mogherini: EU subtenos Kubon
*EU malakceptas la rimedojn, kiujn Usono prenis lastatempe por izoli plu Kubon p. 04*

Manifestacioj en Irano subtenas agadon de registaro kontraŭ perforto
*En la urboj Ahvaz, Abadan, Bushehr, Kermanshah kaj Qom p. 04*

Antaŭlasta konservejo de nuklaj poluitaĵoj
*Juĝejoj favoras al la suferantoj p. 05*

Elektra baterio kiel energikonservilo
*Ambaŭdirekta ŝargado p. 08*

Anticipe al “*Apple*” italoj registris la markemblemon “Steve Jobs”
*Fratoj venkis la grandegan firmaon p. 09*

Hodiaŭe
*Friedrich Dürrenmatt; Umberto Eco; kaj Kipro p. 09*

# Sud-Afriko: la loĝantoj de getourboj de Johanesburgo mortas pro poluado

Ili estas duoble viktimoj de la mizero. La loĝantoj de la getourboj ne nur estas la plej malriĉaj de Sud-Afriko, ili ankaŭ vivas en areoj poluataj de dekoj da jaroj de minekspluatado. La plej videbla poluado estas tiu polvo ellasata de karbo-restaĵo. Sed oni trovas ankaŭ arsenikon, plumbon, uranion, kiuj mortigas iom post iom la loĝantojn.



200 minejaj teramasoj kaj preskaŭ 600 forlasitaj minoj ekzistas ĉirkaŭ Johanesburgo. Ili estas heredaĵoj de la orimpetego kaj de la karbo-ekspluatado. Soweto, la getourbo de Nelson MANDELA kaj ties miliono kaj duono da loĝantoj, enkalkulas multegajn kazojn de spirmanko.

La kazoj de tuberkulozo kaj astmo ĉiuaĝe tuŝas personojn. Ankaŭ haŭtmalsanoj multnombras.

La kaŭzo estas jena: ekde kiam la vento blovas, ĝi deponas danĝeran nigran polvon en la hejmoj. Eĉ la nutraĵoj estas kovritaj, se ili ne estas tuj konsumitaj. Ĝi entenas restaĵojn de kupro aŭ plumbo, cianuro kaj arseniko. La plej insida estas la radioaktiva poluado. En la malnovaj mingalerioj, 6 000 tunoj da restaĵoj de uranio estis enfositaj, laŭ universitata studaĵo. Cele al evito de konsumado de la akvo poluata per uranio, Johanesburgo importas sian trinkeblan akvon el Lesoto, 380 kilometrojn for de tie.

Kompreneble, pluvoj kaj inundoj transportas poluaĵojn ĉien. Kanaloj ja estis fositaj piede de la minejaj teramasoj por kolekti la defluadajn akvojn. Sed pro manko de administrado, ili ofte estas damaĝitaj, kaj ellasas la poluatajn akvojn tra kampoj kaj herbejoj. Ĝuste tie, kie la gregoj paŝtiĝas kaj la infanoj ludas. Laŭ la asocio de lukto kontraŭ kancero, la situacio estas tiel senesperiga, ke la sano de 400 000 personoj estas minacata.

La kompleta purigado de la malnovaj minoj montriĝas neebla, pro ĝia kosto kaj, ĉefe, ĉar la esk-proprietuloj estas nesolventaj aŭ nekonataj. Koncerne la konatajn proprietulojn, ili silentas kaj neas la rilatojn inter poluado kaj sano de la loĝantaro. Ĉiaokaze, neniu epidemiologia studaĵo ekzistas pri tiu temo.

La sola solvo por la loĝantoj estus forlasi la lokojn. Sed ili estas tro malriĉaj por fari tion.

Neniam Milito Inter Ni

# Federica MOGHERINI: EU subtenos Kubon

Vizitanta supera reprezentanto de la Eŭropa Unio pri eksteraj aferoj kaj sekureca politko Federica MOGHERINI diris merkrede [03 jan 2018] en Havano, ke la EU malakceptas la rimedojn, kiujn Usono prenis lastatempe por izoli plu Kubon, kaj volas stari kune kun tiu insula lando dum ĝiaj reformoj.




MOGHERINI faris la rimarkojn dum renkontiĝo kun kubaj studentoj. Ŝi diris, ke en junio de 2017, Usona Prezidento Donald TRUMP streĉis politikojn pri Kubo, kaj tiu ago certe malsukcesos. Ŝi aldonis, ke la EU ne akceptos unuflankajn rimedojn prenitajn de Usono kontraŭ Kubo por eviti malboniĝon de la duflankaj komercaj rilatoj.

Jam validiĝis la interkonsento pri politika dialogo kaj kunlaboro, kiun subskribis la EU kaj Kubo en la 1a de novembro 2017, kaj tio markis malfermon de la nova paĝo de la duflankaj rilatoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Manifestacioj en Irano subtenas agadon de registaro kontraŭ perforto

La irana novaĵ-televido raportis merkrede [03 jan 2018], ke tiutage en pluraj iranaj urboj okazis manifestacioj, kiuj subtenis la registaron kaj oponis perforton.



La raporto diris, ke en la urboj *Ahvaz*, *Abadan*, *Bushehr*, *Kermanshah* kaj *Qom* multaj homoj kun paneloj kaj naciaj flagoj en la manoj iris al stratoj. Ili kriis sloganojn, esprimante subtenon al la registaro kaj oponon kontraŭ perforto dum lastatempaj protestoj.


La raporto diris, ke ankaŭ en iuj aliaj urboj ĵaŭde [04 jan 2018] okazos manifestacioj subtenantaj la registaron. Vendrede [05 jan 2018] en la ĉefurbo Teherano okazos mitingo por subteni la registaron.

Lastatempe en pluraj iranaj urboj okazis protestoj, esprimantaj malkontenton pri rapida prezaltiĝo. En iuj lokoj la protestoj estigis konfliktojn, mortis 10 homoj, inluzive de unu policano, kaj publikaj instalaĵoj estis difektitaj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Antaŭlasta konservejo de nuklaj poluitaĵoj

La 28-an de oktobro [2017] oni komencis konservi nukleajn poluitaĵojn en la antaŭlasta (eble la lasta kaj eterna) konservejo konstruita en la urboj *Ookuma* kaj *Futaba*, kie estas nuklea centralo n-ro 1 de *Fukuŝima*.




En la fundo de la konservejo estas sternitaj kontraŭakvaj tolaĵoj por ke poluitaĵoj ne poluu la subteran akvon. Desube la kolektotan pluvakvon oni purigos per maŝino kaj forĵetos en riverojn. Tiu konservejo havas 16 000 hektarojn da tereno, sed tio estas nur 39% de la planita tereno. Estas malfacile akiri konsenton de la terposedantoj.

Sur tiu tereno poste oni konstruos bruligejon de sarkitaj herboj kaj hakitaj arboj kaj konservejon de la forte radioaktiva cindro. La registaro promesis laŭ la leĝo, ke post 30 jaroj (antaŭ 2045) tiu konservejo translokiĝu ekster la gubernio *Fukuŝima*, sed certe neniu kredas tion, ĉar neniu akceptos tiujn danĝerajn instalaĵojn en sian lokon.

En *Fukuŝima* troviĝas 15,2 milionoj da kubaj metroj da poluita tero en provizoraj konservejoj, sportejoj, parkejoj kaj eĉ en ĝardenoj de loĝantoj. Laŭ la plano, plejparto de tiu poluita tero estos transportita en tiun konservejon antaŭ 2020.

## Juĝejoj favoras al la suferantoj

En 2017 venis 3 verdiktoj pri la sufero de la nuklea akcidento. La 17-an de marto la juĝejo *Maebaŝi* (gubernio *Gunma*), la 22-an de septembro la juĝejo *Ĉiba* (gubernio *Ĉiba*) kaj la 10-an de oktobro la juĝejo *Fukuŝima* verdiktis.

En *Fukiŝima* 3 800 homoj akuzas la ŝtaton kaj TEPCO-n. La 10-an de oktobto 1 000 homoj kolektiĝis antaŭ la juĝejo *Fukuŝima*. Kiam ĝi verdiktis favore al ili, ili ĝojkriis. La ĝenerala sekretario de la akuzantaro deklaris: « TEPCO funkciigis nebone tenatajn reaktorojn kaj okazigis la akcidentegon. Ĝi estas atencinto. La ŝtato kaj TEPCO duope provis kaŝi sian kulpon. Tion la juĝejo malkaŝigis.»

El tiuj tri juĝadoj, tiu de *Maebaŝi* estis preskaŭ venko kaj tiu de *Fukuŝima* estis prefekta venko por la akuzantoj. En tiuj du pli da kompensa mono estis aprobita, sed la sumo estis tro malgranda. En *Maebaŝi* 39 milionoj da enoj por 62 akuzantoj (averaĝe po 630 000 enojn por unu akuzanto) kaj en *Fukuŝima* 500 milionoj da enoj por 2 907 akuzantoj (averaĝe po 172 400 por unu). La verdikto de *Ĉiba* ne estis tiel bona, ĉar ĝi ne konfirmis kulpon de la ŝtato, sed ĝi aprobis kompensan monon kontraŭ perdo de vivbazo en hejmloko por la suferantoj, kaj ĝi aprobis 376 milionojn da enoj por 42 akuzantoj kiel la kompensan monon (averaĝe po 9 milionojn por unu).

La juĝantaro en Fukuŝima klarigis pri antaŭvidebleco de la cunamo jene:

«*La ŝtata komitato pri okazontaj tertremoj raportis en julio 2002, ke laŭ la pacifika marbordo de la insulo Honŝuu povos okazi grandaj tertremoj, kiuj povos kaŭzi grandajn cunamojn je la probableco de 20% en la venontaj 30 jaroj. Se la ŝtato tuj studus la raporton, ĝi povus antaŭvidi la 15,7-metran cunamon, kiu atingos la reaktorojn. Se la ŝtato tiutempe ordonus al TEPCO kontraŭrimedon por tio, la akcidento estintus evitenda. La ŝtato neglektis tion, tial ĝi estas kritikenda.*»




**13 reaktoroj estas forĵetataj**

La 22-an de decembro Kansaja Elektra Kompanio publikigis, ke ĝi decidis forĵeti du reaktorojn en la nuklea centralo *Ooi* en la gubernio *Fukui*. Post la nuklea akcidento en *Fukuŝima* la regularo por bonteni la reaktorojn fariĝis pli severa, tial malgrandaj reaktoroj, por kies riparo kaj plibonigo oni devas elspezi pli multe, ne estos profitaj. Tamen tiuj du estas grandkapablaj, povonte produkti 117,5 kilovatojn da elektro (plejparto de aliaj forĵetataj reaktoroj produktis pli-malpli 50 kilovatojn), tial ŝajnis, ke ili estas profitaj. Tiu decido signifas, ke reaktoroj nun fariĝas ne profitaj. Komenciĝis erao de forĵetado de reaktoroj, sed forĵeti ilin mem estas tre malfacile por la elektraj kompanioj.

La plej granda malfacilo estas kien forĵeti nukleajn rubaĵojn. Tiuj rubaĵoj estas klasifikitaj en tri nivelojn, kaj ĉiuj estos enterigitaj. La plej danĝeraj rubaĵoj estos enterigitaj pli ol 70 metrojn profunden dum la venontaj 100 mil jaroj. El la forĵetataj kaj forĵetotaj 9 reaktoroj ekestos 80 mil tunoj da tiaj rubaĵoj, sed oni ankoraŭ neniam enterigis ilin. Nur la elektrokompanio *Genden* prezentis planon, ke ĝi enterigos rubaĵojn en la truegon 100 metrojn longan, 80 metrojn larĝan kaj 4 metrojn profundan en sia tereno, sed Nuklea Reguligada Aŭtoritato ankoraŭ studas pri la plano, kaj la gubernio ne aprobis ĝin.

La registaro decidis, ke rubaĵoj malpli poluitaj ol 0,01 milisiverte jare estu reuzataj, sed ĝis nun nur malmultaj estis reuzitaj en la tereno de elektraj kompanioj, sed ekstere neniam.

Por perfekte forĵeti reaktoron, oni bezonas pli ol 30 jarojn. Dum la komencaj 5~10 jaroj oni ekzamenos la instalaĵojn kaj purigos ilin, dum la postaj 8~10 jaroj oni malmuntos ne tiel poluitajn instalaĵojn, kaj dum la postaj 6~9 jaroj oni malmuntos reaktoron kaj fine dum 4~8 jaroj oni malmuntos ĉiujn instalaĵojn kaj tie aperos pura tereno. El tiuj laboroj la plej malfacila estas malmuntado de reaktoro, ĉar ĝi estas tiel dense poluita, ke homoj ne povas labori tie, do anstataŭe robotoj laboras/os, sed por tio oni bezonos tre altan teknikon.

En revuoj oni klarigas la malfacilojn kiel

supre, sed mi havas kroman timon. Tio estos manko de laborforto. Homoj ne volas labori en tiu danĝera loko, ĉiam almetiĝante al radioaktiveco. Laŭ leĝo, homoj, kiuj jam elmetiĝis al pli ol 100 milisivertoj dum 5 jaroj, ne plu povas labori en nuklea centralo, do la kompanio devas dungi pli kaj pli da novaj, senspertaj laboristoj. Nun ĝenerale en Japanio mankas laborforto. Multaj kompanioj dependas de aziaj eksterlandanoj.




Nur en nuklea centralo n-ro 1 de *Fukuŝima* laboras 10 mil homoj ĉiun tagon. Por forĵeti 11 reaktorojn, minimume oni bezonos 100 mil laboristojn ĉiun tagon kaj devos dungi pli da novaj laboristoj ĉiun jaron. Ĉu sufiĉos laborforto por tio? Ĉu sufiĉos bonkvalita laborforto por tio? Ĉu la elektraj kompanioj povos elspezi tiom da mono? Ĉu la japana ekonomia forto daŭros tiel longe? Dume ĉu ne okazos aliaj kataklismoj?

**La juĝejo Hirošimo malpermesis funkciadon de la reaktoro en la nuklea centralo *Ikata***

La 13-an de decembro la apelacia juĝejo Hirošimo verdiktis, ke reaktoro n-ro 3 de la nuklea centralo *Ikata* en la insulo *Ŝikoku* ne funkciu pro danĝero de ebla grandega erupcio de la monto Aso en la insulo *Kjuuŝuu*. Tiu reaktoro nun estas ekzamenata kaj oni planas ekfunkciigi ĝin en januaro 2018, sed tio povos estis neebla. La unuan fojon en la apelacijuĝeja nivelo la kontraŭnuklea flanko venkis. Tio estas tre granda por ni.

Alia menciinda afero pri tiu ĉi verdikto estas, ke la juĝejo malpermesis la funkciadon surbaze de la regularo de Nuklea Reguligada Aŭtoritato. Tiu ĉi aprobis refunkciigon de la reaktoro, taksante la danĝeron de granda erupcio de la monto Aso ignoreble malgranda, sed tiu verdiktis, ke ekzistas danĝero por la homa vivo pro la grandega erupcio de la vulkano Aso 130 kilometrojn for de la nuklea centralo *Ikata*.

Ĝis nun en juĝejoj la ĉefa debato temis pri tertremoj, sed en tiu ĉi juĝejo temis pri vulkanoj kaj erupcioj, kaj la juĝejo verdiktis, ke laŭ la regularo decidita de la Aŭtoritato oni devas pli severe taksi la staton kaj danĝeron de vulkanoj. Japanio estas vulkana insularo, do ĉie estas danĝeraj vulkanoj. Dank' al tiu ĉi verdikto, la kontraŭnuklea flanko akiris novan armilon por batali kontraŭ la registaro kaj la elektraj kompanioj.

En la nuklea centralo *Ikata* troviĝas tri reaktoroj. La kompanio jam decidis forĵeti reaktoron n-ro 1, pri reaktoro n-ro 2 ankoraŭ ne decidis kion fari al ĝi, kaj ĉi-foje la juĝejo malpermesis la funkciadon de reaktoro n-ro 3. Nuklea politiko alfrontas ĉiam pli kaj pli damalfavoro, sed ankoraŭ la registaro kaj la industria mondo klociĝas al nukleo.

Hori Jasuo

# Elektra baterio kiel energikonservilo

Baldaŭ povus esti avantaĝe funkciigi sian fridujon per la energio el la baterio de elektra aŭtomobilo. Ambaŭdirekta ŝargado ebligas tion.



Uzi la aŭtomobilan baterion kiel energikonservilon por la fridujo aŭ la televidilo, tiun eblecon *Mitsubishi* ofertas jam de jaroj. La pure elektre motorizita malgranda aŭtomobilo *EV* kaj la konektebla hibrida modelo *Outlander* jam de la jaro 2013 estas ĝenerale ekipitaj por ambaŭdirekta ŝargado.

Veturiloj kun tiaj ŝargaparatoj estas destinitaj por kaj alpreni kaj eldoni energion. Kondiĉo estas ke la ŝargstacio akceptas tion. Ĝis nun la ebleco por ambaŭdirekta ŝargado estas investo por la estonteco, ĉar tiaj ŝargstacioj estas tre multekostaj. Sed tiuj kostoj estonte signife malaltiĝos.

La ŝargado de la baterio en elektra aŭtomobilo bezonas simplan, analogan komunikadon. Se la energio fluu en ambaŭ direktojn, tiam la komunikado inter la ŝargilo kaj la ŝargstacio devas esti pli altnivela kaj cifereca. Tio igas la aferon multekosta, ankaŭ pro tio ke stacioj por ambaŭdirekta ŝargado devas esti rapidŝargaj kolonoj.

Por la rapida ambaŭdirekta ŝargado oni bezonas inteligentan administradon de la ŝargstacio per surmura kesto kiu agordas la ŝargoforton kaj la kvanton da energio ŝargata. "Uzi elektran kurenton el la aŭtomobila baterio havas nur sencon se vi produktas vian elektron ekzemple en fotovolta instalaĵo kaj se vi mem konsumas la baterian kurenton", diras fakulo en Germanio.

La plenŝargita porhibrida baterio de la *Outlander* povas konservi proksimume tiom da elektro kiom kvarkapa familio konsumas en unu tago. Tio tamen estas hazardo. La konserva kapacito de la baterio estas tiel dimensiumita, ke ĝi ebligas veturi 40 ĝis 50 kilometrojn.

Laŭ la ideo de *Mitsubishi* la kurento fluu rekte en la doman reton kaj paralele funkciu bufra konservilo. Se dumtage la suno brilas, la fotovoltaj instalaĵoj produktas multe da elektro, dumnokte aliflanke neniom. Tiel la konservilo estas ŝargataj dumtage kaj la elektro estas konsumata dumnokte. Se la elektra aŭtomobilo ne estas bezonata por veturado, tiam la baterio estas uzebla kiel energikonservilo.

La pli ofta ŝarĝiĝo de la baterio pro la ambaŭdirekta ŝargado evidente ne damaĝas al ĝi, ĉar kurentoj kaj energikvantoj en la dommastrumejo kompare al funkciado dum veturado estas tiel malaltaj ke ili ne prezentas signifan plian ŝarĝon. Tial *Mitsubishi* povas oferti garantion de ok jaroj por la motora baterio.

La afero ĉiukaze progresas. Oni trovas paŝon post paŝo solvojn por plibonigi la sistemon de konservado kaj ekonomia konsumado de elektra energio. Tiel la veturado per aŭtombiloj kun elektra motoro povas disvastiĝi kaj pliintensiĝi. Nia medio urĝe bezonas tion.

Esperanta Retradio

# Anticipe al *“Apple”* italoj registris la markemblemon “Steve Jobs”

Steve Jobs (Steven Paul Jobs) mortis la 5-an de oktobro 2011. Kune kun Steve Wozniak li kunfondis la firmaon “*Apple Computer Inc*”. Julie de la jaro 2012 du italaj estreprenistoj, nome la fratoj Giacomo kaj Vincenzo Barbato decidis registri markon kun la nomo de tiu pioniro de la komputila industrio.




“Ni volis krei novigaĵon, kiu omaĝus iun samtempulan geniulon. Jobs estas Leonardo Da Vinci de la moderneco. Per merkatika esplorado ni konstatis, ke *Apple* ĝis tiam ne registris kiel markemblemon la nomon de sia fondinto”, klarigas la fratojn.

Batalo okazis en itala tribunalo, pro kontraŭstaro de *Apple* al tiu registro, sed la fratoj venkis la grandegan firmaon: “La opozicio estas plene rifuzita”, tion oni legas en la juĝafero finita la 28-an de februaro 2014.

Giacomo kaj Vincenzo jam anoncis, ke ekde januaro 2018 ili surmerkatigos luksajn komputilaĵojn kun la markemblemo Steve Jobs.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog


---



## Bildo de la tago

**Moskeo *Selimiye* (iama Katedralo Sanka Sofia), Nikozio, Kipro.**

**Vikipedio**



# Friedrich DÜRRENMATT


**Friedrich DÜRRENMATT (['friːdrɪç ˈdʏrənˌmat]; Esperantigite Fridriĥ Djurrenmatt) (naskiĝis la 5-an de januaro, 1921 en *Konolfingen* apud Berno, mortis la 14-an de decembro, 1990 en *Neuchâtel*) estis svisa verkisto, scenaristo kaj dramisto.**

**En Esperanto aperis: *La blindulo; La Svisoj estas samtempe liberaj, malliberuloj kaj gardistoj de si mem.***

**Vikipedio**

---

# Umberto Eco



**Umberto Eco [UmBERTo Eko] (naskiĝis la 5-an de januaro, 1932 - mortis la 19-an de februaro, 2016) estis itala verkisto kaj semiotikisto.**

**Eco pri Esperanto: "*... Mi iom studis ĉiujn tiujn utopiojn pri kreado de lingvo perfekta aŭ de la origina, Adama lingvo, ĝis tiuj lingvoj kiujn oni nomas universalaj, kiel Esperanto, volapuko kaj aliaj, kiuj ne celas esti perfektaj lingvoj, sed helplingvoj. Kaj je tiu okazo mi eĉ studis la gramatikon de Esperanto por kompreni pri kio temas. Kaj mi venis al du konkludoj. Ĝi estas tre, tre bone farita lingvo. El lingvistika vidpunkto, ĝi vere sekvas admirindajn kriteriojn de [lingva] ekonomio kaj efikeco. Due, ĉiuj movadoj por internaciaj lingvoj fiaskis, sed ne [tiu de] Esperanto, kiu plu kunigas aron da homoj ĉie en la mondo, ĉar malantaŭ Esperanto estas iu ideo, idealo; mi celas ke Zamenhof ne nur konstruis lingvan objekton, sed malantaŭ tiu estis ideo, [...] ideo de frateco, ideo pacisma, kaj tiu forto de idealo - pro kiu la esperantistoj eĉ estis persekutataj sub la naziismo kaj la stalinismo - konservas ankoraŭ la komunumon de la e-istoj. Oni ne povas diri ke ĝi fiaskis. Sed necesas diri unu aferon. La kialo pro kiu iu lingvo sukcesas, estas ĉiam nedifinebla.*" (H. MASSON) El: intervjuo al radio *Paris Première* (27-a februaro 1996).**

**Vikipedio**